

n-ro 43

januaro 1994

ISSN 0941-9306

# La Merkato

Kontraŭe al la antaŭvidoj, ĉi tiu numero ankoraŭ estas produktita de la provizora redaktoro. Por la numero 44 la "vera" redaktoro finfine reaktiviĝos.

Ĉi tiu revuo jam estas sendita al la legantoj dum decembro 1993. Mi esperas ke en ĝi vi trovos interesan legaĵon por la novjara periodo.

La kasisto antaŭdankas pro rapida pago de la kotizo por 1994 (aŭ pluraj jaroj). Kontrolu la supran linion de la adresetikedo. Informoj pri membreco troviĝas je paĝo 2.

Ĉion bonan por 1994 deziras al vi

Roland ROTSAERT

---

## **Enhavo**

Kunlaborantoj por Terminara Sekcio de IKEF serĉataj . . .	3
Konferenco pri Scienco kaj Tekniko, Beijing . . . . .	3
La malfermiĝo kaj disvolviĝo de Nepalo . . . . .	4
Vojaĝo al Tibeto . . . . .	4
Kiel informi pri Esperanto . . . . .	5
Komercaj petoj kaj proponoj . . . . .	9
Kiu estas kiu en scienco kaj tekniko . . . . .	10
Pola Radio - Mondkomerco kaj lingvo . . . . .	11
Aliĝo - Adresŝanĝoj - Donacoj - TAKE / LA DOMO . .	12

---

**La Merkato (LM)** estas organo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare kaj servas al la membraro kiel komuna komunikilo.

**La Estraro de IKEF:** S-ro Franz Josef Braun (FJB), Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert (RR), Financa Konsilanto; D-ro István Gether, S-ro François-Xavier Gilbert (FXG); D-ro Marco Picasso; S-ro Seikô Yamasaki; S-ro Daniel König (dk).

**Revizoro por la financa raporto:** D-ro Gianfranco Polerani.

**Centra sidejo:** Ĉe s-ro Frans Josef Braun, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

**Financa sidejo kaj membrara administrado:** Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio, telefono+fakso: +32.(0)50.330004.

**Redaktora sidejo:** Ĉe s-ro Daniel König, Speyerer Str. 80, D-68535 Neckarhausen, Germanio; telefono + fakso +49.(0)6203.2765.

---

**La jara membreca kotizo** estas 400 belgaj frankoj, 20 nederlandaj guldenoj, 20 germanaj markoj aŭ 10 usonaj dolaroj. Dumviva membreco akireblas pere de unufoja egalvalora pago de la 20-obla membreca kotizo.

**Kontoj:** Ĉe UEA kaj FEL, kodo ikef-c, kaj belga poŝtĉekkonto 000-1592629-83.

**Perantoj:**

**Cinio:** S-ro **WANG Tianyi**, Xi'an Esperanto-Asocio, Xiyinglu 74 hao, CN-710054 Xi'an

**Francio:** S-ro François-Xavier **GILBERT**, F-55000 Longeville en Barrois (CCP 1275-89 L Nancy)

**Germanio:** S-ro Franz Josef **BRAUN**, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl 16 (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400)

**Hispanio:** S-ro Pedro Antonio **MACANAS VALVERDE**, Av. Libertad, 6-2, E-30009 Murcia (Banco Central, filio 0049-2518, Asoc. Grupo Esperantista "Ricardo Coderniu", n-ro 002-672-1-0027; Kotizo: 1.800 ptas.)

**Hungario:** D-ro István **GETHER**, Palóc u. I, H-1135 Budapest XIII

**Italio:** D-ro Marco **PICASSO**, via de Gasperi 7, I-20057 Vedano al Lambro

**Japanio:** S-ro **YAMASAKI** Seikô, J-185 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12 (pĝk. n-ro Tôkyô 6-253232, kotizo 1400 enoj)

**Pollando:** S-ro Maciej **PIEGAT**, ul. Dantego 1-B/48, PL-01-914 Warszawa

**Togolando:** S-ro Gbeglo **KOFFI**, B.P. 13169, Nyékonakpoé, Lomé

---

### **Kunlaborantoj por Terminara Sekcio de IKEF serĉataj !**

Ekde la demisio de s-ro Hans Wiersch de sia posteno kiel kunordiganto de terminara laboro, tiu laboro en IKEF vakas, verdire eĉ ne ekzistas.

Tio estas bedaŭrinda afero, ĉar unu el la elstaraj taskoj de kiu ajn faka asocio estas la esperantigo de nove aperintaj terminoj de tiu fako kaj rezulte el tio la eldono aŭ ĝisdatigo de fakvortaroj. Tial IKEF nepre devas daŭrigi la terminaran laboron. Ĉe tio ankaŭ estas necese, ke la Terminara Sekcio konsistas el personoj diverslingvaj por eviti idiotismojn ĉe kreado de novaj Esperanto-terminoj.

Pro tio ni alvokas ĉiujn membrojn, kiuj ŝatas tian kreaĵon vortfaradon kaj sentas la talenton por tio en si. Se vi pretas kunlabori en nia Terminara Sekcio, bonvolu avizi tion al la prezidanto.

La Estraro

### **4-a Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto**

**Beijing, Ĉinio, 10-a ĝis 17-a de julio 1994**

Aliĝilo kaj informoj haveblaj ĉe:

Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio en la  
Ĉina Akademio de Sciencoj  
52 Sanlihe, CN-100864 BEIJING  
telekso 22474 ASCHI CN, fakso 00861-851 1095

### **La malfermiĝo kaj disvolviĝo de Nepalo**

Antaŭ la jaro 1950 Nepalo estis lando preskaŭ fermita al la mondo. Toni HAGEN estis membro de la unua teamo de eksterlandanaj ekspertoj kiu, en 1950, estis enlasita en Nepalon por doni konsilojn pri la disvolviĝo de la lando.

---

Oni esperis ekscii de li, geologo, ĉu eventuale ekzistas mineralaj riĉecoj en la lando. Estante sviso, li baldaŭ konstatis ke la Himalajo havas la saman strukturon kiel la Alpoj, kio signifas ke ĝi estas malriĉaj je ercoj. Do, li devis elrevigi siajn komisiantojn, kio estis malfacila tasko.

Li tamen restis en Nepalo dekdu jarojn kaj helpis iniciati alimanageran disvolviĝon, precipe tiun de vojoj kaj hidroelektra energio. Sen liaj geologiaj kaj geografiaj esploroj tra la tuta lando, tia disvolviĝo ne estus okazinta.

Toni HAGEN verkis siajn memoraĵojn kun sprito en la libro *Brücken bauen zur Dritten Welt: Erinnerungen an Nepal 1950-1992* [Pontojn konstrui al la tria mondo: Memoraĵoj de Nepalo 1950-1992]. La libro aperis en 1992 ĉe eldonejo Akademia, Sankt-Augustin (Germanio).

(el "MONTEJO", revuo de Nepala E-Asocio, P.O. Box 6304, KATHMANDU; revuo abonebla tra sendo de internaciaj respondkuponoj)

### **Vojaĝo al Tibeto**

Nia ĉina membro WANG Tianyi (117; adreso je paĝo 2) planas organizi en junio 1994 vojaĝon al Tibeto. Li mem gvidos la grup(et)on. Antaŭvidita kosto estas ĉ. 3.000 DEM (inkluzive de flugbileto Eŭropo-Ĉinio). Interesitoj kontaktu lin por obteni pliajn informojn.

### **Kiel informi pri Esperanto ?**

Makrosocio malmulte kaj maltrafe atentis al la esperantokomunumo. Ni ĉiuj esperantistoj bone konscias kaj multe diskutas en la movadoj kaj lokaj kluboj pri tiu frustriga fenomeno. Se ni konsideras niajn movadajn klopodojn laŭ la rezultoj ĝis nun atingitaj, ni devas konstati ke la informadaj strategioj kaj taktikoj eble ne estas la plej trafaj: ĉu ni fakte aplikadas la modernajn surmerkatingajn teoriojn al Esperanto ?

Dum 5 tagoj oni pridiskutis tiun tiklan temon en staĝo okazinta, tuj post la 78a UK, en Bouresse ĉe "La Kvinpetalo-", la esperantista kulturcentro de Société Yvonne Martinot, franca filio de la Kooperativo de Literatura Foiro, sub la titolo "Surmerkatingo de Esperanto".

---

Jam de la komenco ĝuste pri la terminologio oni diskutis, ĉar la vorto "surmerkatingo" ne plene kontentigas la ĝeneralan signifon: surmerkatingo estas nur parto (la fina parto) de pli ampleksa scienco, kies nomo internacie uzata estas la angla "marketing", kiu laŭ la 16a regulo de la Fundamento fariĝas stranga vorto, kies reduktiva sufikso "-ing" neniel rilatas al la menciita scienco. Pro tio kaj la staĝantoj kaj la gvidanto preferis enkonduki la vorton "merkatingo".

La unua sekcio de la staĝo estis do dediĉita ĉefe al terminologio, kiel enkonduko, tamen ne (kiel oni povus opinii), nur teoria kaj akademia. Tio utilis fakte por pli profunde kompreni la esencon de la staĝo mem. La staĝo, laŭ la intencoj kaj praktike, disvolviĝis laŭ la modernaj merkatingaj teorioj de la makrosocio, kiuj cetere bonege aplikiĝas ankaŭ al nia mikrosocio.

Komprenoble ne eblas en simpla artikolo raporti detale pri la tuta staĝo kaj la dokumentoj disdonitaj al la staĝantoj, ankaŭ por ne vanigi la ĉeeston de la volontuloj. Por la interesatoj verŝajne LF Koop eldonos specifan aĉeteblan kajeron kun la kompleta kurso kaj dokumentaro.

La staĝo disvolviĝis en du partoj: unu enkonduka pri la merkatingaj teorioj, alia praktika kun diskutoj kaj cerbumadoj, kiuj donis cetere bonajn rezultojn.

Tri estas la ĉefaj temoj pritraktitaj: kiu devas informi, pri kio informi kaj kiel informi. Tri temoj ŝajne banalaj kaj jam ofte ekspluatitaj, sed, kiel tuj aperis al la staĝantoj, surprize novaj se oni konsideras ilin laŭ novtipa vidpunkto.

### **Kiu devas informi pri Esperanto ?**

Kiuj estas kaj tradicie estis la Esperantistoj ? Sufiĉas analizi tiun demandon por kompreni kial ĝenerale Esperantistoj ne kapablas reklami trafe "pro manko de entreprenemo". Jen fakte la unua respondo, kiu venis rekte el la staĝantoj post la unua parto, kiam la gvidanto, post klarigo de multaj komunaj eraroj en "varbado" (jen eraro, varbi anstataŭ informi, ekzemple) demandis la kialon. Se ni analizas kiuj estas "la Esperantistoj" ni povas dividi ilin en tri kategoriojn: 1) la orienteŭropanoj, vivintaj dum generacioj sen iu ebleco fariĝi entreprenistoj; 2) en la okcidentaj landoj, la plejparto estas instruistoj, do ŝtataj dungitoj; 3) tria kategorio estas intelektuloj aŭ laboristoj (SAT), kies ĉefaj interesoj neniam estas/estis konsideri la lingvon entrepreneme.

---

Sekve, tiuj esperantistoj ĉiam klopodas vendi Esperanton kiel lingvon aŭ kiel filozofion/religion (la interna ideo, la frateco, la dua lingvo por ĉiuj, ktp.). Kaj ĝuste pro tio oni tro ofte uzas la vorton "varbi".

### **Kian Esperanton vendi ?**

Jen la plej grava parto, al kiu pli da tempo estis dediĉita kaj kiu kontentige donis al la staĝantoj la eblecon revizii kelkajn bazajn opiniojn.

Se ni analizas la modernan merkaton, ni devas konstati ke lingvoj posedas du partojn: "hard"-an (firman aŭ malmolan) kaj "soft"-an (molan). "Firma" estas la strukturo, la gramatiko, nome ĝia norma parto. "Mola" estas la valoraro de la lingvo, ekzemple ĝia literaturo, kulturo, la sento de prestiĝo, la praktika utilo, ktp. Kiujn firmajn kaj molajn valorojn havas Esperanto ? Nur se ni listigas tiujn valorojn ni povas koni KIAN Esperanton surmerkati.

Tradicia propagando insistas per kutimaj sloganoj, kaj pro tio ĝi distanciĝas de la moderna lingvomerkatado. Esperanto estas vere tre forta lingvo kompare kun la aliaj en sia firma parto, sed ĝi estas malpli forta ol ekzemple la angla, laŭ sia mola parto (nome la avantaĝoj: ekonomia, kariera, por persona prestiĝo, ktp.) Pro tio oni preferas elspezi multe da mono por akiri fortan lingvon kiel la anglan (sendepende de la rezultoj).

Surmerkati Esperanton estas ĉefe tio: oni tendencas "vendi" ĝian firman parton (facilecon, rapidan lerneblecon, belsonecon) sed ne kapablas vendi la molan, nome la kulture pliriĉigajn valorojn, ankaŭ ĉar ofte la tradicia propagandisto mem ne bone konas ilin.

Estas klare ke tiu mola parto ne konkeras amasojn, sed samtempe ĝi povas konkeri pli interesajn homojn, igi ilin pli celkonsciaj kaj retenen ili en la lingvouzo.

Kutime oni pesas la sukceson laŭ rezulto de kvanto sed ne de kvalito. Kiam okazas kurso oni mezuras kiom da homoj partoprenas kaj finas ĝin, ne kalkulante la plej gravan faktan: kiom da homoj uzos daŭre Esperanton kaj vivos Esperantion.

Sume, la enhavo de Esperanto estas temo nekonata por la varbato sed ofte ankaŭ por la varbanto.

La lastaj konsideroj enkondukas al la tria parto:

### **Kiel surmerkati Esperanton laŭ ĝiaj "molaj" valoroj ?**

---

Tio signifas analizi la produkton kaj kiel ĝi situas en la merkato, nome ĉu ĝi estas juna aŭ matura produkto, kia estas ĝia bildo kaj kiel rekonstrui taŭgan modernan bildon de Esperanto: kian postvendan servon la movadoj kapablas doni al la kursanoj ? Nur kluban vivon, UK-ojn, festivalojn, bultenojn, aŭ, kiel en la makrosocio, kulturajn kaj distrajn servojn (literaturo, muziko, kulturcentroj) kiujn ili povas ĝiu la tutan jaron ? Sufiĉus ĉi tiuj punktoj por plena staĝo aŭ seminario.

En "La Kvinpetalo" staĝantoj analizis la fortajn kaj malfortajn punktojn de nia lingvo kaj evidentigis la interesajn "merkatajn niĉojn", la celgrupojn kien direkti siajn informajn klopodojn. Kuncerbumado (la tiel dirita "cerbo-ŝtormo" de la profesiaj reklamistoj) inter la staĝantoj starigis longan liston de nekutimaj fortaj punktoj, tro ofte forgesataj de informistoj (aŭ informemuloj ?).

La staĝantoj, post analizo de la mola parto de Esperanto, ekzercadis sin pri tiu ne sufiĉe taksata aspekto, pli socia ol lingva, kaj sur tiu bazo oni verkis novtipajn mesaĝojn, celantajn al specifaj grupoj (junuloj, emeritoj, vojaĝemuloj, ktp.) metodo kiu cetere ŝparigas monon kaj tempon.

Ankaŭ la analizo de konkurenco (ĉagreniga punkto) fariĝas, laŭ tiu ĉi vidpunkto, pli simpla. Se ni akceptas rezigni disinformadon kaj preferas mesaĝi al selektitaj grupoj, ni jam de la komenco evitas kontraŭbatali la ĉefan konkurencon, kiu estas "neniu intereso krom mono kaj kariero" aŭ "neniu kultura intereso". Tio konsciigu nin ke Esperanto ne taŭgas por konsumantaj amasoj sed por elitoj, kvankam ne necese nombre limigitaj, ke kvalito multe pli gravas ol kvanto, ke nova pozitiva bildo por Esperanto devas veni de la Esperantistoj mem, kiuj tamen utiligu la lingvon laŭ ĝiaj valoroj prefere ol normoj, ĉiam kaj ĉie, ankaŭ inter samlandanoj kaj samklubanoj, eĉ "kun si mem" legante, verkante, pensante en Esperanto, por formi kvalite altnivelan klason, kiu povas pruvi al la makrosocio la verajn valorojn de tiu ne nombra sed diaspora, unika, mikrosocio.

Nome, ĉar ne plu eblas kaj eĉ ne interesas, almenaŭ dum la venonta dekjaro, ke Esperanto fariĝos la "lingvo de flughavenoj" kiel Umberto Eco diris, restas nur unu alternativo: la Raŭma vojo.

Marco PICASSO

## **Komercaj petoj kaj proponoj**

### Albanio

---

ALBATRAG-93 establas kontaktojn inter albaniaj kaj alilandaj firmaoj; pokvanta eksporto-importo de diversaj varoj; aranĝoj por turistoj (unuopuloj kaj grupoj). Adreso: Rr. Punëtorët e Rilindjes, Shkalla 4, Pallati 2, Ap. 63, TIRANA.

### Burundio

Kudrado (i.a. de afrikaj vestaĵoj). Kikulu Mukeba Bertin, B.P. 4083, Ngagara, Bujumbura, Burundio  
(tra H. Bakker - el Eventoj, 1/nov.93)

### Ĉinio

Tapiŝo purŝafa, pezo 750 g je kvadrata futo, diversaj desegnoj, prezo (FOB) 3 USD je kvadrata futo. Ankaŭ komerco pri tapetoj, manlaboraj artaĵoj kaj infanludiloj. Aliaj proponoj estas bonvenaj. Firmao SIDA, s-ro HUANG Zheng Su, Liuan lu 26, Box 136, CN-230069 HEFEI, tel. +86-551-214014.

Ĉiuspeca vendo kaj aĉeto: S-ro Zhang Guang ming, Jinzhong-areo int.komp., 40 Xi shun cheng St., Yuci, Shang Xi. Tel. 00-86-354-225241, fakso 221675; aŭ pere de ges. Lambert-Yong-Hong, Av. des Acacias 121, B-4460 Grâce-Hollogne, Belgio, tel. 32-41-50.48.83.

Kunlaboro kaj interŝanĝoj rilate al komerco, arto, turismo, kulturo, investoj, ekspozicioj. EPĈ Informagentejo de Nanchang, s-ro Wen Gang, Beijing Donlu 22 Hao, Sheng Jishi Gongshi, CN-330029 NANCHANG, Jianxi.

### Hungario

ZÓNAJ & Ko ĉiusemajne eldonas komercan bultenon 1001 (hungare kaj esperante), kiu enhavas ofertojn de diversaj entreprenoj el multaj landoj. Interesiĝintoj pri kunlaboro sribu al: p.k. 331, H-6501 BAJA.

### Litovio

Specialaj kovertoj (po 0,25 USD - min. 1000); produktoj de dizajn-studio. Alfredas MARUŜKA, p/k 50, LT-5250 PASVALYS.

Konstruado-produktado-servoj-komerco. UTESTA estas privatigita ŝtata konstrua entrepreno en regiono kun bonaj vojoj kaj substrukturoj kaj altnivela laborpovo. Posedas disponeblajn vendejojn, fabrikojn kaj rezervejojn. Adreso: Tauragnu 54, LT-4910 UTENA; tel./fakso 370 39 69275.

### Ukrainio



---

Esperanto-eldonejo disponas pri sufiĉe da papero, sed mankas diversaj materialoj kaj maŝinaro por presejo. Esperanto-Eldonejo "Bona Koro", S-ro Vasil Stanoviĉ, Regiono Lviv, vul. Gonĉarska 4, UA-293720 DROGOBIĈ, tel. (03244)2-23-48. Financa helpo eblas tra UEA-konto VSST-I.

Perado kaj transporto. Firmao LIGAS, Inĝ. Ivan Lisenko, Abonkesto 37, UK-314000 Poltava, poŝtejo; tel. 2-14-27.

### Vietnamio

APROMACO (agrikulturaj produktoj kaj materialoj) deziras importi: sterkojn, pesticidojn, agrikulturajn maŝinojn; kaj eksporti: rizon, kafon, kaŭĉukon, anakardian nukson (cashew nuts), arakidan nukson, teon, sojon, pipron, cinamon, sovaĝan kardamomon (semen Amomi Xanthiodis). D-ro Bui dinh Tu, APROMACO, 14b - 226 Str., Van Mieu, Hanoi; fakso 54647.

### Kiu estas kiu en scienco kaj tekniko

Baldaŭ pretiĝos nova eldono de tiu adres- kaj inform-aro. Interesitoj skribu al la kompilanto, sinjoro Christian DARBELLAY, Kaiserstr. 43, D-24143 KIEL, Germanio.

(el *Esperanto*, nov. 93)

### Pola Radio

Esperanto-Redakcio de Pola Radio nun estas ĉiutage aŭskultebla per jenaj frekvencoj (horoj en mezeŭropa tempo):

\* 15.30 h.:

(mallongaj ondoj) 11815, 9540, 9525, 6135, 7145 kHz

\* 22.30 h.:

(mallongaj ondoj) 6135, 5995 kHz; (mezaj ondoj): 1503 kHz

Evidentiĝas ke tiuj frekvencoj estas bone, foje eĉ perfekte, estas kapteblaj en grandaj partoj de Eŭropo. Adreso por reagoj kaj informoj: Pola Radio, Esperanto-Redakcio, P.O. Box 46, PL-00-950 VARSOVIO, fakso +48-22-444-123.

### Mondkomerco kaj lingvo

Tio estas la titolo de nova, 46-paĝa broŝuro verkita kaj eldonita de nia membro W. Bormann. Ĝi estas studmaterialo por kursoj de la Akademio Internacia de la Sciencoj en San-Marino kaj konsistas el tekstoj de prelegoj dum la

---

Internaciaj Kongresaj Universitatoj en Rotterdam ("Komerco stimulas kompreniĝon") kaj Havano ("Ekonomia forteco kontraŭ kultura diverseco").

La broŝuro estas havebla ĉe la libroservoj de UEA kaj FEL, aŭ rekte ĉe la aŭtoro: Werner Bormann, Schärstr. 26, D-21031 HAMBURG (5 DEM, inkl. de sendkostoj).

### **SURVOJE**

#### **Dumonata Revuo de Unuiĝo por Novtipa Internacia Kulturo**

Jara abono: 130 francaj frankoj al pĉk. 1025 02 T Nancy de La Gazeto, F-55210 CREUE, Francio

Redakcio: pk 168, UKR-335057 SEBASTOPOLO-57, Ukrainio

---

### Nova aliĝo

180. Prof. Dai Liming, Huada Korp. de Scienco k Teknologio,  
CN-519030 Wanzai, ZHUHAI, Guangdon, Ĉinio

### Adresŝanĝoj

64. SROGOSZ: privata telefonnumero estas 042-46 27 09.

84. NAKADA: Wicherweg 13, D-40667 MEERBACH,  
privata tel. 02132-76279.

La adreso de IKEF-membro WNUK (poste restante, Warszawa 82)  
ŝajne ne plu validas. Ĉu iu membro konas la aktualan  
adreson ?

### Donacoj

Palmyre Nijs-Flamand 100 BEF

## **TAKE**

### **Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistoj**

"TAKE" estis oficiale fondita okaze de kunveno  
en Mittelwihr (Francio) dum oktobro 1993.

Informoj pri la asocio kaj pri ĝia revuo  
"LA DOMO / JARCENTO 21" estas haveblaj ĉe:

S-ro Bruno SCHMITT, TAKE,  
RN 83, Rue de Tiefenbach,  
F-68920 WINTZENHEIM (COLMAR), Francio.